46a Jaro — N-ro 2a — Februaro 1954a

BELGA ESPERANTISTO

Fondita en 1908a

Redaktoro-Administranto
Maur. JAUMOTTE
Avenuo De Bruyn, 44
Wilrijk-Antverpeno

Oficiala monata Organo de
REĜA BELGA LIGO ESPERANTISTA
Asocio sen profita celo,
aliĝanta al UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Abonprezo: Fr. 100,-

Ni havas du Prezidantojn . . . kaj ili vivu!

La du Prezidantoj:
D-ro Paul Kempeneers (maldekstre) kaj S-ro Maur. Jaumotte (dekstre), tuj post la akcepto en la Urbdomo de Antverpeno, en 1947a, dum la unua postmilita Kongreso, organizita de R.B.L.E.: akcepto dum kiu S-ro Jaumotte paroliskiel prezidanto de la L.K.K. kaj D-ro Kempeneers, kiel Liga Prezidanto.

Sabaton, la 16an de januaro, la francoj zorgis, per solena transdono de la Povoj, ke ili eliru tiun unumonatan periodon, dum kiu ili havis du prezidantojn de la Republiko.

Kaj tiun saman tagon, la administrantaro de Reĝa Belga Ligo Esperantista kunvenis en Bruselo kaj zorgis ke tiu ĉi dum du aŭ tri monataj havu, siavice, du prezidantojn.

Kiel dirite en la decembra numero de nia revuo, la Prezidanto D-ro Kempeneers decidis eksiĝi el sia funkcio plej laste dum la jarkunsido de aprilo proksima. Intertempe, kaj laŭ lia peto, S-ro Jaumotte, vicprezidanto, jam plenumis, ekde decembro, la prezidantan funkcion.

Ĉar ankaŭ la kasistino S-ino Plyson estas eksiĝanta, la administrantaro decidis kunmeti la estraron por la jaro 1954a jene: Prezidanto: S-ro Maur. Jaumotte; Vicprezidanto: S-ro J. Soyeur; Ĝenerala Sekretario-kasisto: S-ro H. Sielens; Gazetara Sekretario: S-ro Michel Pilloy.

D-ro Kempeneers tamen ĝis aprilo konservos la titolon kaj nur tiam, dum la ĝenerala jarkunsido, oficiale rezignos.

Kaj tiel fakte ni havas nun du prezidantojn, kiuj, dum la dudek jaroj de la prezidanteco de D-ro Kempeneers, ĉiam man' en mano, kunlaboris; ĉar S-ro Jaumotte, kiu iĝis kasisto de la Ligo en la jaro 1929, estis poste ĝenerala sekretario-kasisto, direktoro de la organo kaj vicprezidanto kaj, en tiuj diversaj funkcioj, senĉese helpis la prezidantojn Frans Schoofs kaj D-ron P. Kempeneers en ilia laboro.

Se Reĝa Belga Ligo kaj ĉiuj ĝiaj membroj sincere kaj profunde bedaŭros la foriron de sia prezidanto, tiu bedaŭro estos mildigata per du faktoj.

La unua estas ke la foriranto tamen ne foriras. Li ne nur restos administranto de la Ligo, sed li intertempe iĝis prezidanto de Belga Centra Komitato Esperantista, en kiu li, — kvankam temas nur pri Komitato —, certe trovos okazon por ankoraŭ multon fari por Esperanto.

La dua fakto estas ke, malgraŭ sia 37 jara esperantisteco, malgraŭ sia jam longa laborvivo sur la grupa, liga kaj instituta kampoj, la nova Prezidanto de la Ligo ankoraŭ disponas pri sufiĉa laborkapablo por esperigi ke lia prezidanteco estos same fruktedona kaj feliĉiga por la Ligo, kiel tiu de liaj antaŭuloj.

Kaj al ambaŭ, en tiu ĉi momento, iras dankema penso pro farita kaj farota laboro.

Ili vivu!

H. S.

R.B.L.E.

Administrantara Kunsido de la 16-a de januaro

Tiun ĉi kunsidon ĉeestis; S-roj P. Kempeneers, prezidanto; Maur. Jaumotte, vicprezidanto; H. Sielens, ĝenerala sekretario; S-ino J. Plyson, kasistino; J. Soyeur, sekretario; F-ino Obozinski kaj s-roj Pilloy, Van den Bossche kaj Verstraeten.

Financa situacio: Pro la fakto ke ŝi eksiĝas kiel kasistino de la Ligo, S-ino Plyson antaŭmetas jam nun definitivan bilancon pri la jaro 1953a kaj ĝiaj ciferoj, kiuj cetere montras agrablajn surprizojn, estas unuanime aprobataj.

S-ro Jaumotte esprimas la esperon ke, kvankam ŝi eksiĝas kiel kasistino, S-ino Plyson tamen ne nur daŭrigos ĉeesti la administrantarajn kunsidojn, sed ankaŭ lin helpos en la estonteco, laŭ siaj rimedoj kaj eblecoj.

Kaj tion S-ino Plyson promesas, dum ŝi mem esprimas la deziron resti la flegantino de la „Fondaĵo Jennen", pri kio ĉiuj akordiĝas.

Estas decidite ke S-ro Sielens, ek de nun, prizorgos la kason kaj tiucele venos al Bruselo por transpreni la paperojn en kunsido kun S-ino Plyson, D-ro Kempeneers kaj eventuale S-ro Jaumotte.

Beneluksa Kongreso: S-ro Soyeur donas multajn klarigojn pri la organizo de la Beneluksa Kongreso kaj komunikas la provizoran programon, kiu estos presata en la tri revuoj.

Antaŭkongreso en Antverpeno: S-ro Jaumotte komunikas kelkajn detalojn

39a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO - HAARLEM

Poŝtfako 140, Haarlem, Nederlando

31-an julion - 7-an aŭguston 1954

OFICIALA KOMUNIKO

Pagoj: Rotterdamsche Bank, Haarlem. Poŝtĝirkonto 604997.

Grave: La L.K.K. akceptas nur pagilojn ŝanĝeblajn en banko k.s. Ĝi absolute ne akceptas librojn aŭ varojn.

Multaj personoj ankoraŭ sendas aliĝilojn al Haarlem kaj pagojn al perantoj. L.K.K. petas, ke oni sendu aliĝilon kaj pagon al la sama instanco, ĉu al Haarlem, ĉu al peranto.

Multaj personoj pagis sen aliĝilo. Sen detaloj ne eblas enskribi la aliĝon. Se oni ne havas aliĝilon petu tion de landa asocio. Ne sendu ian ajn paperon, kiu eble ne konformos al la arkiva sistemo.

Dua Bulteno: La Dua Bulteno estas en la presejo kaj atingos ĉiujn aliĝintojn en januaro. Kun ĝi estos la oficialaj Mendiloj por loĝejoj kaj ekskursoj. L.K.K. akceptos mendojn NUR per tiuj dokumentoj, kiuj formas parton de la arkiva sistemo. Sekve, ne mendu per letero aŭ poŝtkarto.

Fakaj asocioj: La L.K.K. disponigos senpage salonojn al „kunlaborantaj fakaj asocioj" (de U.E.A.). Aliaj asocioj devos pagi. Asocioj dezirantaj salonojn por fakaj kunsidoj kiel eble plej baldaŭ komuniku tion al L.K.K. kun indiko pri la atendata nombro, kiu ĉeestos. La Oficiala Programo estas en preparo. Post aprobo de U.E.A. ŝanĝoj kaj aldonoj estos fareblaj nur post novaj konsultoj kun la Estraro.

Karavanaj aranĝoj: La L.K.K. avertas, ke ĝi neniel helpos al aŭ kunlaboros kun privataj aranĝantoj de karavanoj, kiuj memstare agas. Al tiaj aranĝantoj, kies agoj povas malutili al la organizado de la kongreso, la L.K.K. povas, laŭ la Kongresa Regularo, rifuzi aliĝon.

Sveda Esperanto-Federacio informis, ke ĝi rajtigis aranĝi karavanon al Haarlem: Ungdomens Resebyra, Jungfrugatan 30, STOCKHOLM O, pere de S-ro K. E. Karlsson.

Kotizoj: Multa konfuzo ekzistas pri la kotizoj de edzinoj. Jen ekzemploj (por la dua periodo):

Edzo (kaj ĉiu plenkreska homo)	guld.	22.—
edzino	„	11.—
Edzo (membro de U.E.A.)	„	19.50
Edzino de membro	„	9.75

La limo de partopreno en la kongreso estas 2000 personoj. Post atingo de tiu cifero L.K.K. rifuzos pliajn aliĝojn. Cetere ankaŭ post la 30-a de junio aliĝo estos neebla.

Statistiko: (ĝis fino de 1953): Aŭstrio 6, Belgujo 30, Britujo 133, Brazilo 3, Danujo 20, Finnujo 17, Francujo 20, Germanujo 92, Hispanujo 3, Indonezio 1, Italujo 42, Japanujo 1, Jugoslavio 50, Kanado 2, Kostariko 1, Nederlando 361, Norvegujo 37, Novzelando 9, Portugalujo 3, Svedujo 76, Svisujo 16, Turkujo 2, Usono 5. Sumo 930 el 23 landoj (pasintjare 458). Aktuale jam pli ol 1.300 (Red.)

Mason Stuttard,
Konstanta Kongresa Sekretario.

pri la provizora programo de tiu antaŭkongreso.

Estraro: Pro la facileco, S-ino Plyson jam tuj transdonos al S-ro Sielens la kasajn dokumentojn. D-ro Kempeneers eksiĝos oficiale dum la ĝenerala jarkunsido, sed petis, jam de nun, S-ron Jaumotte anstataŭi lin kvankam li, dum la sekvontaj monatoj ankoraŭ helpos laŭpove.

La estraro por 1954 estos do kunmetata jene: Prezidanto, S-ro Jaumotte, Vicprezidanto: S-ro J. Soyeur; ĝenerala sekretario-kasisto: S-ro H. Sielens; Gazetara sekretario: S-ro Michel Pilloy.

La sekvonta administrantara kunsido okazos la 24an de aprilo.

Repagu tuj vian kotizon

Jam du numeroj de nia revuo aperis en 1954 kaj estas senditaj al ĉiuj membroj kaj legintoj de la antaŭ jaro.

Ĉiu tamen komprenos ke la prezo de la presado estas tro alta, por ke ni povu daŭrigi tiun alsendon al nerepagintoj.

Ni do avertas ĉiujn ke TIU ĈI NUMERO ESTAS LA LASTA, kiun ricevos tiuj membroj kaj legantoj, kiuj antaŭ la 20a de februaro ne estos repagintaj sian kotizon aŭ abonon.

La grupestroj atentigu siajn membrojn pri tio.

Pri J.B.

En la Bulteno de Esperantista Klubo en Praha — kiu mem povas aperi nur je du stencilitaj paĝoj, ni ĉerpas enhavon de letero, skribita de konata literaturisto, aŭtoro de pluraj romanoj kaj poemkolektoj, (nu vi certe rekonos lin per la komencliteroj de lia nomo!):

„El via letero, kvankam vi klopodis resti seka raportanto, venis freŝa alblovo, optimisma admono al mi kaj al miaj amikoj, al kiu mi legis vian leteron. Ne miru! Ni ja tute ne havas okazon kaj ejon por kunvenoj, kaj nur hazardoj renkontigas nin jen surstrate, jen ĉe iu oficejo ktp. Kvankam ni iom envias la ĉeĥoslovakajn E-istojn pro eblecoj, kiujn ni ne havas, tamen ni ĉiuj tre ĝojas, ke persisto kaj entuziasmo por tia kulturmovado, kies utilon eble timas eĉ tiuj, kiuj ŝatas prediki pri internacia homa solidareco.. Tamen la historia evoluo pravigos nin.

Iam ankaŭ en nia urbo prosperis tiel la kluba vivo kaj dank' al tio eĉ nun ekzistas tiom da celkonsciaj adeptoj, kiuj sufiĉas por rekomenci la laboron.. Ni atendas la momenton, kiam la kultura miopeco ne plu malhelpos la disvolviĝon de sopiroj, kiuj deziras havi faktan rimedon por krei pacon, justecon kaj homan solidarecon inter la popoloj.

...Nun estas mia vico peti vin, ke vi ne forgesu transdoni la salutojn kaj plej sincerajn bondezirojn al viaj klubanoj, al viaj kunlaborantoj kaj al ĉiu samideano, kiu akcelas ĉu per studo, ĉu per laboro nian movadon. Esperon!"

Ĉu komento necesa?

Atentu la sekretarioj!

Pro la fakto ke nia revuo, ekde nun, aperos ĉiumonate, - krôm dum la feria periodo, - pli granda reguleco estas necesa.

Do, ĉio nè ensendita ĝis la 15a de ĉiu monato estos prokrastata ĝis la revunumero de la sekvonta monato.

Migrado, internacia Problemo

de Hugh Gibson

Direktoro de la Interregistara Komitato por Eŭropa Migrado.

Estas nova kaj kuraĝiga antaŭeniro de internacia agado ke ŝtatoj estas kuniĝintaj, por helpi pri transmara migrado el Eŭropo. Simile al aliaj laŭdindaj klopodoj faritaj de la socio de liberaj ŝtatoj en ĉi tiu maltrankvila postmilita periodo, estas ago kiun ili estas devigitaj fari. La kronika problemo de troloĝateco en okcidenta Eŭropo alprenis tiel danĝerajn proporciojn dum la lastaj dudek jaroj ke ĝi minacas renversi kian ajn ekonomian kaj politikan stabilecon atingitan post la fino de la dua mondmilito.

La termino „troloĝateco" estas malpreciza kaj facila vorto por situacio kiu estas tute nedifinebla science sed kun kies urĝeco ni konatiĝas ĉiutage pli.

Estas treege malfacile taksi la nombrojn de tiel nomitaj superfluaj homoj nuntempe en Okcidenta Eŭropo kies ĉeesto estigas ekonomian ŝarĝon kaj politikon minacon. Diversaj institucioj estas penintaj fari tiajn taksojn — kaj tiuj ĉi etendiĝas de tri al kvin milionoj" — sed ili konfesas ke en ĉi tiu epoko de grandega scienca progreso estas preskaŭ neeble doni iun ajn firman kaj fiksitan proporcion plejbonan de enloĝantaro rilate al vivrimedoj en ŝtato.

Estas sufiĉe certe tamen ke troloĝateco estas urĝa problemo por kelkaj eŭropaj landoj. Parolante pli homare, estas sufiĉe certe ke milionoj da homoj estas devigataj vivi je tute nesufiĉaj vivoniveloj en regionoj kie aliaj laborkapablecoj ne povas estis plene utiligitaj, dum tiuj samaj homoj povus esti tre valoraj se ili povus migri al landoj kie oni urĝe bezonas iliajn spertojn kaj kapablecojn. Estas transmare vastaj neprogresintaj teritorioj kiuj ne povas plene utiligi siajn eventualajn rimedojn sen ordigita enfluo de eŭropa „homforto". Estas neimageble ke ni daŭre malŝparas la kapablecojn de farmistoj kaj lasas produktan teron neplantita kiam la mondo bezonas nutraĵon kaj dum ĉiu lando de la okcidenta mondo grave bezonas la aldonitan strategian forton de homsufiĉeco rilate al agrikultura produktado. Kaj tio kio estas vera pri farmistoj estas vera pli aŭ malpli rilate al ĉiuj kategorioj de neokupataj aŭ nesufiĉeokupataj laboristoj en Eŭropo.

Krom ke estas ekonomia absurdaĵo, la problemo estas reala socia kaj politika danĝero. Jam en la jaro 1946, eminenta ekonomiisto, la Profesoro William Roepke avertis pri tiu danĝero: „Se ĉi ela pordoj de enmigrado estas fermataj kaj estiĝas pli kaj eĉ pli da ŝtatoj kie oni ne povas akiri oficon eĉ de nura purigisto se oni ne estas ano de tiu ŝtato — tiam vere la politikaj landlimoj estigas gravegan ekonomian problemon, tiam ‚loĝspaco' ĉesas esti nur lertaĉa devizo de imperialista propagando, kaj tiam la enloĝantoj de la pli malriĉaj landoj ne povas ne rigardi avarece kaj envie la pli feliĉajn ŝtatojn. Tiam internacia klasbatalo inter tiuj ŝtatoj povus fariĝi tragedia realeco."

Post 1946 la problemo daŭre iĝis pli granda kaj pli urĝa. La premoj de troloĝateco en Italujo, Germanujo, Aŭstrujo, Nederlando kaj Grekujo — citante la plej tipajn „elmigradajn landojn" — pli kaj pli akutiĝis pro kelkaj kialoj, enhavante la longdaŭran malpliiĝon de migradaj movadoj, la perdo de teritorioj kaj kolonioj kaj la malpligrandiĝo de eneŭropa komerco sekve de streĉitaj rilatoj inter okcidento kaj oriento. Aldone, okcidenta Eŭropo vidas konstantan enfluon de politikaj rifuĝintoj kiuj aldonas novan ŝarĝon al la ekonomioj de jam troplenaj landoj, kaj kiuj povas esperi la rekonstruadon de deca vivo por si kaj siaj familioj nur se ili estas permesataj migri al transmaraj landoj prezentantaj sufiĉajn ŝancojn al laboro.

Por helpi malŝarĝi Eŭropon de ĝia surplusa enloĝantaro kaj samtempe helpi la progresigon de maltroloĝataj transmaraj areoj, 16 ŝtatoj de la libera mondo kuniĝis en Decembro, 1951, por starigi la Interregistaran Komitaton por Eŭropa Migrado (IKEM). Ili sciis ke migrado ne estis la sola solvo de la problemo sed ili elkomprenis ke ĝi estis necesega parto de la entuta solvo. Ili ankaŭ sciis — kion la sperto de ĉi tiuj postmilitaj jaroj abunde pruvis — ke normala, spontanea migrado ne sufiĉas nek por malpezigi la ŝarĝon de enloĝantaro de troplenaj eŭropaj landoj nek por ripari la mankon de la homomalsatantaj transmaraj teritorioj.

Fakte, apenaŭ mi povas pripensi kampon de agado kie internacia planado pli urĝe necesas. La migrado estas kompleksa procedo kiu komencas en la ŝtato de origino (kie la migronto estas preparenda mense kaj materiale por sia nova vivo), daŭras sur la ŝipoj kiuj portas la migranton direkte al ties nova hejmo kaj finiĝas nur monatojn poste en fremda fora lando kiam la migranto estas lokiĝinta kaj firme starigita kune kun sia familio.

Tute tra ĉiuj tiuj stadioj internacia helpo estas necesa, almenaŭ por multaj kategorioj de migrantoj! Plue la esplorado de novaj okazoj de migrado, la efektivigo de duflankaj kaj multflankaj interkonsentoj, la evoluigo de novaj metodoj por la edukado de migrantoj, la normigo de pli efikaj kaj rapidaj kriterioj de elekto, la samtempa movo de migrantoj de multaj ŝtatoj de origino al multaj ŝtatoj de finalveno, ĉiuj estas agoj klare en la sfero de internacia kunlaborado.

Tamen kiam la Interregistara Komitato por Eŭropa Migrado estis kreata oni donis al ĝi limigitan taskon dum limigita tempoperiodo. Laŭ la fundamenta rezolucio tiam akceptita la celo de la Komitato estis „fari aranĝojn por la transportado de migrantoj, por kiuj ekzistantaj faciligoj estas nesufiĉaj kaj kiuj alie ne povus esti movataj, el iuj eŭropaj ŝtatoj havantaj surplusan enloĝantaron al ŝtatoj transmare kiuj prezentas okazojn por bonorda enmigrado, konforme al la politikoj de la koncernataj ŝtatoj". Eĉ se ĉi tiuj taskoj ŝajnas limigitaj kiam oni komparas ilin kun la grandeco de la problemo, estas memorinde ke, post multaj jaroj de pli aŭ malpli senfrukta internacia diskutado, ĉi tio estis la unua peno eklukti kun la problemo sur bazo konkreta kaj praktika.

La sperto akirita dum la komenca periodo de funkciado pruvis ke helpo nur pri transportado, kvankam tio estas tre grava, ne sufiĉis plilarĝigi la fluon de migrado el Eŭropo. Tial la Komitato estis preta sin okupi pri aliaj formoj de agado, ampleksantaj aliajn fazojn de la migrada procedo.

Hodiaŭ, post preskaŭ du jaroj da aktiveco, estas eble rerigardi la faritajojn ĝis nun atingitajn kaj vidi pli klare la vojon antaŭen.

Unue, la membraro. De la originalaj 16 fondintaj ŝtatoj, la membraro de la IKEM kreskis ĝis 24, enhavante ĉiujn elmigradajn ŝtatojn de Eŭropo, la ĉefajn enmigrantajn ŝtatojn — ok el ili en Latina Ameriko — kaj kelkajn aliajn ŝtatojn, ekzemple Francujo, Belgujo kaj Svislando, kiuj kvankam ne rekte koncernataj komprenas la socian ekonomian kaj politikan gravecon de la problemo.

Due, la Komitato estas movinta pli ol 145,000 homojn el Eŭropo al novaj hejmoj transmare. El ĉi tiuj pli ol 40,000 estis rifuĝintoj kaj 26,000 „Volksdeutsche" (laŭoriginaj germanoj) elpelitoj. La ĉefaj ricevantaj ŝtatoj estis Usono, kiu enlasis 43,000 enmigrantojn. Kanado kun preskaŭ 40,000, Aŭstralio, 25,000, Brazilo 19,000 kaj aliaj ŝtatoj de Latina Ameriko proksimume 10,000.

Por 1954, la Komitato celas movi 117,600 eŭropajn migrantojn transmaren.

Alia atingo de la Migrada Komitato estas la plibonigo de „teknikaj servoj", necesaj por certigi ke la migrantoj helpataj daŭre instalos sin en siaj adoptitaj landoj, kaj ke farante lokon por si mem ili ankaŭ helpos fari lokon por aliaj jam venontaj.

Teknikaj servoj ampleksas plenan diversecon de iniciatoj. En Italujo kaj Nederlando laboristoj en la metala kaj konstruada metioj antaŭ ol foriri al Brazilo trapasis monatojn de instruado pri brazilaj labor-metodoj kaj pri la portugala lingvo. Grekoj elektitaj por relokiĝo en Aŭstralio kaj Brazilo lernas sian novan lingvon hejme kaj instruado daŭras eĉ sur la ŝipoj kiuj portas ilin transmaren. Interkonsento estas farita kun Argentino inaŭguri farmlernejon en la provinco de Buenos

Akademio de Esperanto.

La lastaj informoj de la A. de E. (okt. 1953) sciigas al ni la ŝanĝon de art. 6 de la statuto pro aldono de jena frazo: „Se devas okazi rebaloto, ĉar ne sufiĉe da kandidatoj ricevis la absolutan plimulton, en tiu rebaloto la relativa plimulto decidas".

La konsisto de la A. restis preskaŭ sama, ĉar nur tri malnovaj membroj ne estis reelektitaj; kiel novajn membrojn, ni notis: G. Canuto (it.), F. A. F. Faulhaber (ned.), W. J. A Manders (ned.), J. Regulo Pérez (hisp.) kaj K. Söderberg (sved.).

En la kadro de la 39-a U.K. en Haarlem, denove okazos publika kunveno de la A., la partoprenantoj povos direkti prilingvajn demandojn kaj libere diskuti pri lingvaj aferoj, sed oni persone ĉeestu. Informojn tiurilate oni petu: Oostduinlaan 32, Hago (Nederlando).

Aires, kie eŭropaj farmistoj pasigos ses monatojn de intensa studado de la hispana lingvo kaj de lokaj agrikulturaj metodoj antaŭ ol ili translogigos al siaj propraj farmbienoj. Informajo por orienti la migrantojn estas kolektita kaj disdonita al kandidatoj por migrado. En Italujo, Germanujo kaj Aŭstrujo, la Komitato helpas al antaŭelektado de la kandidatoj prezentotaj por vizoj al konsuloj aŭ al naciaj elektantaj senditaroj. En Grekujo kaj en la urbo Trieste IKEM eĉ plu agas kaj helpas al la migranto serpenti tra la burokrata labirinto kiu situas inter la petanto por migrado kaj fina enŝipiĝo. Fine, en Brazilo, la Komitato estas reprezentata je la Lokiga Komisiono kiu kolektas kaj taksas petojn por enmigrantaj laboristoj kaj kiu parigas novevenintojn al laborokazoj.

Tiaj servoj estas esencaj por realigi ekzistantajn eblecojn de migrado sed ili ne povas krei novajn okazojn. Por tio la Komitato aventure eniris alian vojon — la stimuladon de projektoj de kampara koloniigo.

Estas preskaŭ neniu ekonomia ekspertizo pri la problemoj de la progresigo de Latina Ameriko kiu ne elmontras diversajn manierojn je kiuj enfluo de kompetentaj eŭropaj laboristoj helpus tiun procedon. Aliflanke, la plejparto de ĉi tiu landoj bezonas ian financadon por sukcese komenci. Laŭ la vidpunkto de Eŭropo la sukcesa evoluigo de vastaj projektoj de kampara koloniigo estas egale necesaj se estas trovota solvo de la tiea problemo de surplusa enloĝantaro. Esploraj interparoladoj kun internaciaj kaj aliaj bankaj institucioj malkaŝis ke ili estis pretaj konsideri financan subtenon al fidindaj projektoj. Do, la mono estas fakte havebla por investado al fidindaj projektoj; Eŭropo havas la homojn kaj abunda tero kuŝas preta kaj atendanta. Kio estis bezonata estis la kataliza agento kiu povis miksi tiujn elementojn. Tion la Komitato penas fari. Estas tasko vere farinda, ĉar la starigo de sukcesaj projektoj de kampara koloniigo ne nur provizas novajn elirejojn por eŭropaj farmistoj sed ankaŭ kreas novajn labor-okazojn por ĉiuj aliaj laboristoj kiuj estas bezonataj por konsistigi la novan ekonomian komunumon.

Fine, atingi pli racian distribuon de enloĝantaro estas malfacile kaj multekosta tasko kiu postulas pozitivan internacian kunlaboradon. Mi estas konvinkita ke kun forta laboro, bonvolo kaj sufiĉaj monrimedoj ĉi tiu praktika ilo kreita — la Migrado Komitato — povas efike pritrakti la problemon. La alternativo, malsukceso, estus duoble danĝera ĉar ĝi ne estus limigita al tuja repuŝo. Ĝi konvinkus multajn ke internacia kunlaborado estas pruviĝinta fiasko, kun la sekvo ke, dum almenaŭ multaj venontaj jaroj, utilus kiel preteksto por bloki estontajn proponojn trakti la problemon sur internacia bazo. Ni absolute ne povas toleri fiaskon kiam ni scias ke ni povas sukcesi.

Trad: R. Harry; kontrolis: H. Jacob

Esperanto-Ekspozicio en Montevideo

Okaze de la Oka Sesio de la Generala Konferenco de UNESKO en Montevideo (de la 14a de oktobro ĝis la 13a de novembro 1954) CED aranĝos, en kunlaboro kun la Urugvaja Esperanto-Societo, grandegan Esperanto-ekspozicion. Ĝia celo estas prezenti en taŭga formo ĉiujn atingajojn de Esperanto en la 66 jaroj de ĝia ekzistado. La ekspozicio estas unu el la ĉefaj branĉoj de la multflankaj klopodoj digne prezenti la aferon de la Internacia Lingvo en Montevideo. La ekspozicio havos jenajn fakojn:

A. **LERNOLIBROJ**: 1) Ŝlosiloj; 2) Nacilingvaj lernolibroj de Esperanto; 4) Vortaroj.

B. **VERKOJ DE ZAMENHOF**: 1) Originalaj verkoj; 2) Tradukitaj verkoj; 3) Nacilingvaj tradukoj de diversaj verkoj de Zamenhof.

C. **BELETRISTIKO**: 1) Verkoj originale skribitaj en Esperanto; 2) Tradukoj el nacilingvaj literaturoj; 3) Nacilingvaj tradukoj el Esperanto.

D. **SCIENCO KAJ FILOZOFIO**: 1) Fakaj vortaroj kaj terminaroj; 2) Verkoj originale skribitaj en Esperanto; 3) Tradukoj el naciaj lingvoj; 4) Tradukoj el Esperanto en naciaj lingvoj; 5) Esperantlingvaj resumoj al nacilingvaj verkoj; 6) Gravaj rezolucioj pri la valoro de Esperanto por sciencaj celoj.

E. **GAZETOJ KAJ REVUOJ**: 1) Ĝeneralaj gazetoj iam aperintaj aŭ nun aperantaj; 2) Literaturaj revuoj; 3) Sciencaj gazetoj, revuoj kaj bultenoj; 4) Aliaj specialaj revuoj, inter kiuj ankaŭ la nacilingvaj revuoj kun Esperantaj resumoj aŭ rubrikoj. (En tiu-ĉi fako estos ekspoziciitaj ĉiuj iom gravaj gazetoj kaj revuoj, sed, se ili ne plu aperadas, nur tutjaraj kompletoj).

F. **DIVERSAJ PUBLIKAJOJ**: 1) Turismaj gvidlibroj; 2) Prospektoj pri diversaj urboj; 3) Afiŝoj kaj prospektoj de diversaj entreprenoj kaj institucioj.

G. **RADIO**: Per trafa desegnajo prezenti la evoluon de la Esperant-lingvaj elsendoj, listo de radiostacioj, kiuj elsendas en Esperanto; se iel eble, estos organizita disaŭdigo de Esperantaj elsendoj dum la ekspozicio mem.

H. **FILMO**: Se iel eble, estos organizita prezentado de Esperantlingvaj filmoj.

I. **KONGRESOJ KAJ KONFERENCOJ**: Unuarangaj fotografaĵoj pri Universalaj Kongresoj, pri fakaj kongresoj kaj konferencoj, pri Internacia Somera Universitato, pri internaciaj kursoj someraj semajnoj, k.t.p.

J. **ORGANIZO DE LA ESPERANTO-MOVADO**: 1) UEA kaj listo de landaj asocioj kaj fakaj organizaĵoj aliĝintaj al UEA; 2) Listo de aliaj internaciaj Esperanto-organizaĵoj; 3) Listo de la ĉefaj Esperanto-eldonejoj. En tiu ĉi fako troviĝos mapo de la mondo, sur kiu estas signitaj la urboj, en kiuj troviĝas: a. delegitoj aŭ fakdelegitoj de UEA (verda flageto); b. Esperanto-eldonejoj, redakcioj de gazetoj kaj revuoj, sidejoj de Esperantaj internaciaj organizaĵoj kaj institucioj (flava flageto); c. Esperanto-societo aŭ grupoj (ruĝa flageto).

K. **OPINIOJ PRI ESPERANTO**: Elektitaj eldiroj pri Esperanto de famaj sciencistoj, filozofoj, verkistoj, politikistoj kaj aliaj ĝravaj personoj.

L. **NACILINGVA LITERATURO PRI ESPERANTO**: Verkoj broŝuroj, studoj pri Esperanto, publikigitaj en naciaj lingvoj.

La tuta ekspozicio estos arte aranĝita kaj ornamita por portreto de D-ro Zamenhof, fotoj de la unuaj Esperantistaj renkontiĝoj, flagoj (laŭ ebleco ankaŭ per la grandega flago de la Universalaj Kongresoj), floroj k.t.p.

La ekspozicio en Montevideo devas fariĝi impona elmontro de ĉio, kion kreis la Esperanto-Movado. Ĝi devas montri la kulturan valoron de la Internacia Lingvo, kaj ĝian socian signifon. Ĝi devas esti potenca atestilo pri la forto de la Esperanto-Movado.

* * *

La materialo de la ekspozicio estas sendota al: R. Garcia, Calle Yaguaron 1397, Montevideo, Urugvajo.

Prof. I. Lapenna.

BELGA KRONIKO

La Antaŭkongreso en Antverpeno

La L.K.K. de la Beneluksa Kongreso Antverpeno 1953, kiu iĝis la L.K.K. de la Antaŭkongreso, kiu okazos en tiu urbo, de la 28a ĝis la 30a de julio proksima, t.e. la tri tagojn antaŭ la komenciĝo de la Haarlema Universala Kongreso, kunvenis dimanĉon, la 17an, kaj prenis jam firmajn decidojn pri la kunmeto de la provizora programo:

Merkredon, la 28an de julio:
Antaŭtagmeze: Malfermo de la akceptejo
Unua kontakto kun la urbo
Posttagmeze: Malferma kunsido kaj bonvenigo de ĉiuj partoprenantoj
Vizito al la Plantin-Muzeo
Vespere: Interkonatiĝa Vespero: Balo

Ĵaŭdon, la 29an de julio:
Antaŭtagmeze: Kultura horo
Oficiala Akcepto en la Urbdomo
Posttagmeze: Ŝipveturado sur la Skeldo kaj vizito de la haveninstalaĵoj
Vespere: Granda Vesperfesto kun teatraĵeto, kantoj kaj skeĉoj.

Vendredon, la 30an de julio:
Antaŭtagmeze: Vizito al la Rubensdomo
Tagmeze: Oficiala inaŭguro de la Dr. Zamenhofstrato
Komuna Festmanĝo.
Posttagmeze: Vizito al unu el la grandaj industrioj en la Antverpena urbego kiel estas: la grandaj petrolinstalaĵoj, la aŭtomobilfabrikoj kaj/aŭ aliaj.
Vespere: Intima adiaŭa kunveno, en gaja atmosfero.

Sabaton, la 31an de julio:
Antaŭtagmeze: Komuna foriro al Haarlem.

Kiel dirite en antaŭ komuniko, la kotizo por tiu ĉi Antaŭkongreso estas Belgaj Frankoj 50, *kiujn oni de nun povas pagi al la P.Ĉ.K. de la L.K.K.-kasisto:* S-ro A. Pittoors, Deurne No. 40.89.41.

Frua aliĝo estas dezirinda por bona efektivigo de la preparaj aranĝoj. Do ne prokrastu vian aliĝon.

La adreso de la L.K.K. estas ĉe la sekretario S-ro H. Sielens, Houwerstraat, 12 Antverpeno.

ANTVERPENO

Esperanto-Grupo „La Verda Stelo"

(Poŝtĉeknumero: 726.54)

La lasta kunvenokazo dum 1953a estis la Kristnaskfesto, sabaton, la 26an de decembro: Fakte estis dancfesto, dum kiu la multaj gejunuloj, kiuj ĉeestis kaj ankaŭ ĉiuj aliaj membroj gaje dancis laŭ la tonoj de plej agrabla muziko, en bele ornamita salono kun lumigita kristnaskarbo.

Nia prezidanto S-ro Maur. Jaumotte elparolis la festparoladon, en kiu li substrekis ke, flanke de la jusokazinta Zamenhoffesto, la Kristnaskfesto, kiu estas la festo de ĉiuj homoj kun bona volo, certe en unua loko estas la festo de la esperantistoj. Poste okazis granda lotumado, zorgeme aranĝita de F-ino H. Toussaint, al kiu ni ŝuldas dankon, same kiel al S-ro Verhoeven, kiu funkciigis la elektran gramofonon.

Pro la fakto ke la nova jaro komenciĝis vendredon, la unua kunsido de 1954a okazis la 8an kun programo: Parolata ĵurnalo. La prezidanto direktis al ĉiuj varmajn bondezirojn kaj tiam oni aŭdis la diversajn rubrikojn de la ĵurnalo, elparolataj de F-inoj H. kaj M. Hofkens, kaj Mimi Ameryckx, S-roj Verhoeven kaj K. Ameryckx kaj S-ino Lecat, kiu rakontis ke ŝi esperantiĝis iame en Polujo dank' al la propagando farita de nun maljuna belga pastro Koenen. F-ino Paula De Ketelaere poste raportis pri vizito, kiun ŝi faris antaŭ kelkaj tagoj al la Grupo de Lille, en Nord-Francujo. Alvoko de F-ino Henny De Ketelaere, por la klubo de la „Klopodantoj", kiuj daŭre, - ankaŭ antaŭ kaj post la kunsido, - paroladas esperanton, konkludis tiun vesperon.

Vendredon, la 15an, okazis la Solena Jarkunsido de la Grupo, dum kiu oni aŭdis detalajn raportojn de S-ro J. Verstraeten, sekretario, kiu honore citis ĉiujn kunhelpintojn dum la jaro kaj speciale dankis la prezidanton; kaj de S-ro H. Sielens, kasisto, kiu atestis ke la kaso bone fartas.

S-ro Jaumotte dankis varme siajn du ĉefajn kunlaborantojn, sed ankaŭ la geprofesorojn S-ron Morris kaj F-inon Henny De Ketelaere, la festestrinon F-inon Toussaint, kiu kun la helpo de sia fratino S-ino Bernaerts, zorgas ke, en speciala sako aŭ kaso, estu mono havebla por ĉiuj elspezoj, kaj kiu permesis, en malmulte da tempo, aĉeti gramofonon, diskojn, mikrofonon kaj specialan lumbildaparaton. Li ankaŭ dankis ĉiujn, kiuj iamaniere kunlaboris por la agrabligo de la kunsidoj.

S-ro Ameryckx nepre volis danki la prezidanton kaj la estraron, nome de la membroj, kiuj ne sidas malantaŭ la estrara tablo.

La Prezidanto tiam konatigis kaj aprobigis la novan estraron por la jaro 1954a: S-ro M. Jaumotte, prezidanto; S-roj Morris De Ketelaere kaj H. Sielens, vicprezidantoj; S-ro J. Verstraeten, sekretario; S-ro Balleux, kiun li bonvenigas en la estraron; kasisto; F-ino Toussaint, festestrino; F-ino E. Van der Weken, gazetara sekretariino kaj protokolantino.

La lasta punkto de la tagordo estis la honorigo de jubileantoj, do de tri membroj, kiuj akiris la arĝentan medalon pro 25-jara membreco: S-ro Hector Boffejon, kies meriton en „La Verda Stelo" kaj en „Belga Esperanto-Instituto" dum la antaŭmilitaj jaroj li substrekis; S-ro G. Van den Bossche, la tiel vigla direktoro de B.E.I., kaj S-ro Roger Jaumotte, denaskiĝa Verdstelano, kiu sukcesis akiri arĝentan medalon je ne jam plena 25jar-aĝo, sed kiun li tamen ankaŭ dankis pro jam donita kunlaboro, kiel paroladisto kaj kunludanto en teatraĵoj surscenaj kaj elsendataj.

Kaj dimanĉon la 17an sekvis tiam la jarfesteno, en beleta salono en la restoracio „Bristol". Sesdek kunmanĝantoj, - inter kiuj grupo de Bruselaj amikoj, - kunsidis ĉe la ĉefa kaj la kvar flankaj tabloj kaj de l' komenciĝo regis la plej agrabla atmosfero. Bonaj manĝoj alportis ĉiam pli grandan gajecon.

Tri paroladetoj: de S-ro Jaumotte, kiu prezidis kaj kiu dankis la bruselanojn, kaj ankaŭ la aliajn ĉeestantojn, honorigis refoje la cititajn jubileantojn kaj vokis al nova laboro, por daŭra plivigligo de la Verdstelana vivo. D-ro Kempeneers diris sian ĝojon esti en la antverpena grupo kaj faris alvokon favore de la Fondaĵo Montevideo, kie la internacia esperanto-movado devos defen-

Por viaj esperantaĵoj, libroj, insignoj k. c.

Belga Esperanto-Instituto

26, Oostenstraat, 26

ANTVERPENO

kiu ankaŭ havigos al vi nacilingvajn librojn, revuojn kaj gazetojn, kaj ĉiuspecan skribmaterialon.

G. FAES

16, Schoenmarkt, 16

ANTVERPENO

—— **Por via MUZIKO,**

RADIO kaj GRAMOFONO

di nian lingvon. S-ro Jaumotte tuj promesis ke La Verda Stelo faros sian devon kaj antaŭmetis sumon, kiu certe estos pagata. S-ro Verstraeten, en tre amuza paroladeto, toastis je la sinjorinoj kaj transdonis belajn florgarbojn al S-ino F. Schoofs kaj S-ino M. Jaumotte. Per du vortoj S-ro Jaumotte dankis nome de ambaŭ kaj legis ankoraŭ telegramojn kaj kartojn de S-ino Elworthy-Posenaer, G-roj Castel kaj S-ro Van den Bossche, kiu lastmomente estis malhelpata ĉeesti pro malsaneto.

Kaj dum kelkaj pliaj horoj la festo daŭradis ĉe vigla dancado.

Belega festo pri kiu ĉiu konservos plej bonan rememoron.

Programo de la venontaj kunvenoj:

Ĉiuvendrede en „Witte Leeuw", Frankrijklei, 4 je la 20,30 (la etaĝo).

Februaro: (memorigo): la 1an (lundon) komenciĝo de Perfektiga Kurso, gvidata de S-ro Morris De Ketelaere; la 5an: Parolata Ĵurnalo; la 12an: Prezentado de filmo fare de S-ro R. Van Eynde; la 19an: Parolado kun lumbildoj de S-ro Hugo Jacques; la 26an: teatra elsendaĵo; la 28an (dimanĉe): Karnavala Balo.

Marto: la 5an: Parolata Ĵurnalo; la 12an: Parolado kun lumbildoj de S-ro R. Balleux; la 19an: S-ino Etty Graeffe parolados pri Ameriko; la 26an: kabareda vespero.

Nekrologo

En la tutunuaj tagoj de la jaro, du membrinoj de „La Verda Stelo" kaj la grupo mem estis trafataj per kruela bato. S-ro Charles Van Reybroeck, malnova fidela membro, ankaŭ konata de multaj eksterurbaj samideanoj, mortis apenaŭ 51jara.

Ni rediras al lia vidvino kaj al lia bofratino la kondolencvortojn, kiujn la prezidanto, kun grava delegacio ĉe la enterigo, al ili tutkore prezentis.

BRUGO

Bruĝa Grupo Esperantista

(Poŝtĉeknumero: 4835.33).

La 22-an de decembro okazis en la grupa sidejo la prokrastita Zamenhofa festo, sub la aŭspicoj de la loka Esperanto Komitato Intergrupa (EKI) en ĉeesto de multnombraj membroj de la „Bruĝa Grupo" kaj de la grupo „Paco kaj Justeco" (sekcio de Fl. L.E.).

Post enkonduka vorto, S-ro Ch. Poupeye, prez. EKI, antaŭlegis la faman leteron de D-ro Zamenhof al Borokvo pri la deveno de Eo. S-ro Dumarey deklamis „La Vojo" 'n kaj du eltirajojn el kongresaj paroladoj de la Majstro. Post usona aŭkcio de kelkaj esperantajoj, lerte gvidata de S-ro Maertens, S-ro F. Roose paroladis interesplene pri la religiaj kaj politikaj ideoj de D-ro Zamenhof. Multlingva skizo: „La Packonferenco" brile ludata de kelkaj membroj de „P. kaj J." amuze finis la programon. La prezidanto ankoraŭ dankis ĉiujn kunlaborintojn kaj komuna kantado de „La Espero" kronis la tuton.

Lasta leciono de la elementa kurso, sub gvidado de S-ro Ch. Poupeye, estis donata la 29an de decembro. Nome de la gelernantoj, S-ro F. Clauwaert dankis la profesoron, al kiu li prezentis donaceton.

Perfektiga kurso komenciĝis la 5an de januaro, post kio portretludado agrabligis la restajon de la vespero.

La 12an de januaro, post la perfektiga leciono, aperis nova numero de la parolata gazeto kun kontribuoj de: F-ino De Staercke pri „La filmaktoro Van Johnson"; S-ro Marcel Poupeye: „Antaŭdiroj por 1954", F-ino Manteleers: „La Pipro"; F-ino Deboo: „La Tibetaj neĝhomoj", F-ino Is. Van Parys: „La Kafogreno" kaj S-ro Ch. Poupeye „Tradukmaŝino".

Programo de la venontaj kunsidoj:

Ordinara kunveno: ĉiumarde, je la 20a, en la sidejo „Gouden Hoorn - Cornet d'Or", Simon Stevinplaats, 2.

La unua horo de ĉiu kunveno estos dediĉata al leciono de **perfektiga kurso.**

NOVA ELEMENTA KURSO komenciĝos VENDREDON 5an de FEBRUARO, je la 20a, kaj estos daŭrigata ĉiuvendrede ĝis fino de Aprilo.

Programo por la dua horo de la **mardaj** kunvenoj:

Februaro: 2an: Muzika vespero. - 9an: Komuna legado de Belga Esperantisto. 16an: Portretludado. 23an: Parolata gazeto.

Marto: 2an: (Karnavalo) Ekskurso al la marbordo por karnavalaj festoj; 9an: Kanta vespero; 16an: Kartludado; 23an: Humoraĵoj. 30an: Surpriza vespero: ĉiu alportu nekonatan premion.

BRUSELO

Esperantista Brusela Grupo

(Poŝtĉeknumero: 1230.48)

La 21-an okazis laŭprograme la perfektiga kurso gvidata de S-ro Van der Stempel.

La 28-an ni finis la jaron per gaja kunesto ĉirkaŭ kristnaskarbo en belege ornamita salono. S-ro Van der Stempel zorgis ĉe la piano por la muzika parto kaj F-inoj Kestens kaj Ghisèle Oleffe kaj S-ro Jirousek ludis unuaktan teatraĵeton: „Falĉilo kontraŭ ŝtono". S-ino Elly Staes legis kristnaskan rakonton, tradukitan el la hungara lingvo: „Kiun el la Sep", kaj rikoltis multe da aplaŭdo Por ĉiuj festaj aranĝoj oni speciale dankis Ges-rojn Weyn kaj S-inon Elly Staes.

La 4-an de januaro okazis nia parolata ĵurnalo; multnombre la gesamideanoj partoprenis kaj bonegaj artikoloj estis legataj; la 11-a estis dediĉita al rakontoj el la Brazila Antologio: „Apologo" kaj „Kartonkapuloj", sekvata de komuna kantado.

Programoj por la estontaj kunsidoj:

Februaro: la 1an: Parolata gazeto; 8an: S-ino Daems parolos pri „Virina Rubriko" (duaparto); 15an: S-ro Van derStempel gvidos la perfektigan kurson; 22an: S-ino Lefèbvre respondos al demandoj pri Jugoslavujo (dua parto).

Marto: 1an: Parolata gazeto; 8-an: S-ino Heyman, memoraĵoj; 15-an: Perfektiga kurso, gvidata de S-ro VanderStempel; 22-an: S-ino Castel, Gastronomia Karnavalo; 29-an: S-ino Ernst, recenzo de libro.

Korespondemuloj

— Deziras korespondi kaj intersanĝi poŝtkartojn, gazetojn kaj poŝtmarkojn: Véra Caltovà, TRUTNOV (Myshveckà 18) Ĉeĥoslovakujo.

— Deziras korespondi kaj intetŝanĝi poŝtmarkojn, 30jara oficistino, protestanta, eksskoltestrino: Jacqueline Louys, Rue des Barres, VALENTIGNEY.

— Deziras korespondi kaj interŝanĝi poŝtkartojn: Jiri Raba, CHRUDIN IV (Markovice 233) Ĉeĥoslovakujo.

— Deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kun belga samideano: Marin W. Koer, Ĉumerna 6 KAZOMLIK Bulgarujo.

BRUGGE BRUGES

Hôtel du Cornet d'Or

2, Simon Stevinplaats, 2

Centra situo - Moderaj prezoj

—— **Moderna komforto** ——

Sidejo de «Bruĝa Grupo Esperantista»

—— **Tel. 314.59** ——

LES ENTREPRISES

DERKS

226, Rogierstrato, BRUSELO

Tel. : 15.19.92

Entrepreno de

KONSTRUAĴOJ

LISTO LE LA MEMBROJ-KOMERCISTOJ

Antverpeno

M. Philips, Karel Rogierstraat 1, Antverpeno. Korsetoj - Rabato de 5 ĝis 10 % por la membroj.
P. van der Hoydonck-van den Buys, Kapelsesteenweg 549, St. Mariaburg. Ŝuoj — Teksaĵoj — Mercerajoj. Tel. 74.27.86
J. Montmirail, Kortemarktstraat 53, Berchem. Arĥitekto. Tel. 39.58.66.
Morris de Ketelaere, Oostenstraat 25, Antverpeno. Ĥemiajoj. Tel. 39.17.09
Henny de Ketelaere, Oostenstraat, 25, Antverpeno. Privataj lecionoj
K. Amerijckx, Melgesdreef 40, Merksem. Centra Ĥejtado. Tel. 45.81.07
R. Vanistendael, Begijnenstraat 3, Antverpeno. Okulvitroj — Rabato de 5 % por la membroj. Tel. 35.09.32.
CL. Peeters, Onderwijsstraat 68, Antverpeno. Apotekejo. Tel. 35.40.67.
Firmo van Iseghem & Verstraeten, St. Bernardse steenweg 631, Hoboken. Vitrajoj — Speguloj — Tel. 37.88.20
J. van Nereaux, Sterstraat 1, Antverpeno. Viandisto. Tel. 39.55.81
J. van Nereaux, Sterstraat 1, Antverpeno. Aŭtoĉar-ekspluado. Tel. 39.20.59
H. Peeters, Vordensteistraat 58, Schoten. Inĝeniero: Neon-lumo, Reklamoj .Tel. 81.48.47.
H. Jacques, Lange Beeldekensstraat 31, Antverpeno. Presaĵoj. Tel. 33.75.38
Verdijck, Oude Doncklaan 106, Deurne. Ĉiaj asekuroj kaj hipotekoj. Tel. 39.06.07
P. Peelman, Volkstraat 34, Antverpeno. Fumaĵoj — Pantofloj. Tel. 37.62.55
Y. Ameryckx, Helmstraat 154, Borgerhout. Peltaĵoj.

KOMERCISTOJ kiuj senkoste propagandas por Esperanto per reklamoj en siaj butikoj:

G. Baeten, Belpairestraat 53, Berchem. Tel. 39.22.81 Frizisto por sinjorinoj.
„De Boerinckens" (Clem. Van Hasselt). Estro de la trinkejo en la Flandra Operdomo.
A. Roels, Montignystraat 155, Antverpeno. Ledaj artikloj-Selisto. Tel. 37.14.07.
M. Blajwas, Lange Kievitstraat 80, Antverpeno. Frizisto. Tel. 32.13.18

Bruselo

Farmaciisto Jacobs, 94, rue général Eenens Bruxelles 3	15.26.01
Farmaciisto N. Nelis, Meise	59.13.73
„BONBONS SWINNE", 77, rue de Nieuwenhove	44.57.36
Imprimerie Lielens, 18, rue de la Princesse	21.10.98
CARRELAGES „Carrart", 19, avenue de Saüo	21.74.49
Viajn MEBLOJN ĉe S-ro Weyn, aĉetu rue Destouvelles, 57	15.96.97
Libroj, Publikajoj, ĵurnaloj, F-ino Kestens 24, rue Bodenbroeck	11.71.03
Tinkturejo, senmakuligejo „DEX" 16, rue Esnest Laude	15.28.29

Verreries et Miroiterie DESMECHT & C°

LA LOUVIERE S.P.R.L. **Tel. n-roj 223.01 - 225.37**

Du esperantaj markoj:

TABULO, por lernejtabuloj; **KATOKULO**, por signalvitroj.

NIAJ ESPERANTO-ENIGMOJ KUN PREMIOJ.

(Selvoj sendotaj al B.E. ĝis la 20.2.54)

Rezulto de la januara konkurso

Por nia unua konkurso, la partopreno estis jam iom grava kaj ni publikigas nun la nomojn, nur de tiuj, kiuj akiris min. 4 el la 5 poentoj; akiris 5 poentojn: S-ino E. Ernst (Bruselo); S-roj J. Soyeur (Seraing) kaj Ch. De Corte (Blankenberge) kaj 4 p.: S-ro Jean Kairis (Stembert).

Anstataŭ forlutumi libron inter la tri laŭreatoj kaj perdigi al la du aliaj la frukton de ilia laboro, ni preferas adicii la aljuĝitajn poentojn al tiuj, akirotaj en la sekvontaj konkursoj kaj atribui iom gravan premion, ĉiujn tri aŭ ses monatojn, - laŭ la intereso vekigita -, al tiu, kiu vere estos la gajninto de la konkursaro.

Kiel dirite la vortoj signitaj (R) celas vorton, eĉ derivitan aŭ kunmetitan, sed SEN la gramatika finaĵo. La radikojn oui trovu en la vortaro de SCHIDLOF-MEULENHOF aŭ en PLENA VORTARO (Grosjean-Maupin).

KOREKTU en figuro No. 2:

SOLVO de 1: krespo; espero; separo; kareso; sukero; resumo; mezuro; numero; rimeno; merito; trempi; premio; perilo; leporo; kolero; koralo; pokalo; skalpo; sparko; krespo.

3. ANTAŬMETU

du literojn al ĉiu el la sekvantaj vortoj por formi novajn vortojn.

La duaj literoj, legataj en la sama sinsekvo, montras proverbon.

lito; lumo; tero; rabi; miri; rento; aktoro; preso; rabeno; rigli; opozicio; libro; signo; cento; armi; marko; terni; vico; enuo; iranto; sekto; vendo; cedi; servi; mato; testo; ringo; rano; mento; spiri; plori; ganto; azuro; piro.

4. KRUCVORTENIGMO.

Horizontale. 1. altpreza; definitiva skribaĵo. 2. difekti ies korpon. 3. korpoparto (R); maŝine deklami (R). 4. vivê kaj gaje (R). 5. science esplori (R); skatoleto (R). 6. ĝi elstaras super la maro (R). 7. samvalora; sucilo de kulo (R). 9. li plenumas la rolon



de iu alia (R). 11. ĝi ebligas vidi malproksimen; muzika instrumento (R).

Vertikale. 1. vitrosimila glazuro (R). 2. disigi (R). 3. kortbirdo (R). 4. flugmaŝino (R). 5. nimfo. 6. rezino donanta bonodoran fumon (R). 7. Li ne loĝas en la kamparo. 8. li vivadas en Afriko. 9. aparta lingvo de samprofesiuloj (R). 10. parto de kelkaj mebloj (R). 11. okulparto (R).

NI KOREKTAS: En la pasintnumera artikolo de F. Faulhaber enŝteligis miskompreniga eraro: „Oni *rekomendas* en tiuj verkoj" anstataŭ: „Oni *renkontas* en tiuj verkoj".

GAZETARA SERVO

(Redaktoro: Michel PILLOY, c/o „ESPERANTO", 18 rue de Franquenies, OTTIGNIES-Brabant)

PROVIZORA RAPORTO 1953

NIA LABORO:

Dum la jaro 1953 nia Gazetara Servo dissendis

25 artikolojn

al 70 jurnaloj, gazetar-agentejoj kaj radioorganizajoj, inter kiuj: 41 franclingvaj, 23 flandraj kaj 6 luksemburgaj.

13 kunlaborantoj en eksterlando kaj pluraj enlandaj korespondantoj helpis nin en nia laboro.

LA REZULTATOJ:

Por la jaro 1953, ni recenzis (ĝis nun)

125 artikolojn

aperintajn en 25 gazetoj (13 franclingvaj, 12 flandraj). Memorige, la ciferoj en 1952 montris: 65 artikoloj en 15 gazetoj. En tiuj ciferoj, ne estas kalkulitaj la grup-informoj redaktitaj de niaj Lokaj Servoj (Antverpena kaj Brusela), pri kies aktiveco aparta raporto aperos estonte.

Kalkulante la tutan eldonkvanton por tiuj 152 artikoloj, surbaze de la ciferoj de jurnal-eldonkvantoj publikigitaj de la Belga Sindikta Ĉambro por Reklam-arto, ni atingas la nombron de

25.557.402 ekzempleroj.

DEFINITIVA RAPORTO kun kiel eble plej kompletaj statistikoj, kiel ankaŭ raporttoj de niaj Lokaj Servoj, aperos en nia venonta kroniko. M. P.

Sekretarioj! Atentu, ensendu viajn tekstojn por la proksima numero plej laste la 15an de la monato.

Bibliografio

TRIESTO...AL KIU? Eldonis Slovenia Esperanto-Ligo, Ljubljana, 1953. Broŝ., 44 p. 14 x 20; 2 kartoj.

Oni ankoraŭ ne forgesis la viglajn, minacajn protestojn de Jugoslavujo, kiu kaŭzis sufiĉe da maltrankvilo kiam antaŭ nelonge la usona kaj brita registaroj konigis sian intencon transdoni la malgrandan Zonon A, kun la urbo Triesto, al Italujo. Kaj multaj miregis tiutempe pro la ŝajne nepravigebla apetito jugoslava.

Opiniante, ke la eksterlando ne povas fari al si objektivan prijuĝon surbaze de nekompletaj aŭ unuflankaj informoj el propra gazetaro, S.E.L. eldonis ĉi tiun broŝuron por eksponi ankaŭ la starpunkton de Jugoslavujo, kiu konkretiĝas en jena konkluda propono:

1) internaciigo de Triesto, (Triesto nuntempe fakte havas itallingvan plimulton; sed, kiel haveno, itala Triesto ne estas vivipova, se Italujo ne kontrolas ankaŭ la jugoslavan fonon. Tiel itala Triesto fariĝos daŭra minaco al paco.)
2) kunigo de la resto de Zono A kun Zono B en aŭtonoma teritorio sub suvereneco de Jugoslavujo: la enloĝantaro estas ja nekontesteble jugoslava.

Certe estas konsilinde ekkoni la vidpunktojn de ĉiuj interesataj partioj antaŭ ol definitive decidi pri gravega demando kiel paco-malpaco, kaj en tiu rilato la broŝuro estu bonvena.

F. C.

HIROŜIMA; kompilis: Kansai Ligo eld. Japana E.-Librokooperativo, Osaka 1952, p. 16.

La broŝureto montras kelkajn bildojn el la filmo „Infanoj de l'Atombombo, kun klarigaj tekstoj en E. Havebla kontraŭ 2 resp. kup. ĉe la Kooperativo, 72, Kitaoogimaci, Kita-ku, Osaka, Jap.

LA BAPTO DE CARO VLADIMIR, de Karel Havlicek Borovsky; trad. el la ĉeĥa: Pumpr Tomas; eld. Serio Stafeto, 1953, p. 141. Recenzota.

RAKONTOJ DE VELKINTA FOLIO, de V. Eroŝenko; eld. E.-Librokooperativo, Osaka (Jap.), 1953, p. 40. Recenzota.

ESPERANTO-TANGO, muziko kaj teksto de Jac. Feitsma. Eldonita okaze de la 39-a U.K. de E. en Haarlem fare de ESPERANTO-MUZIKGRUPO, Antwerpsestr. 45, Bergen-op-Zoom, Ned.

Verantw' uitgever: Reĝa Belga Ligo Esperantista, De Bruynlaan 44, Wilrijk. Drukkerij Krol, Hoofdstraat 31, Uithuizen (Ned.)